# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ kesäkuu ◆ junio ◆ 3/2010



*La talenta pianisto Andrei Korobeinikov renkontis esperantistojn dum koncertvizito en Lahti. En la foto estas de maldekstre Vilorg Teräväinen, Börje Eriksson, Hilkka Galle, gasto Andrei, Eero Rinta-Karjanmaa kaj Esa Lång. Artikolo sur p. 6.* (Fotis Martti Pennanen)

## Alveno de Esperanto en finna gazetaro, p. 8

**Programo de Aŭtunaj Tagoj, p. 15 ◆ Estona mozaiko, p. 19**

**Turkuanoj en biblioteko de Åbo Akademi, p. 21**

# ESPERANTOLEHTI

## Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.
Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo**: 💻 eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*
Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 💻 mmakita@utu.fi
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*
Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 044 3933 924 💻 ilkka.santtila@welho.com
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 22 e/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ 044 2642 742 💻 eaf@esperanto.fi
**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
**Pankkitili/Bankkonto:** Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 💻 eafprezidanto@esperanto.fi
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 💻 paivi.saarinen@iki.fi
**Sekretario/Sihteeri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 💻 eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**
*Paula Niinikorpi*, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 💻 paula.niinikorpi@gmail.com
*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 💻 markku.saastamoinen@kotikone.fi
*Markus Sunela*, Kalevan puistotie 16 B 23, 33500 Tampere. ☎ 040 768 5165 💻 markus.sunela@iki.fi
*Keith (Keke) Uber*, Petter Wetterin tie 4 A 47, 00810 Helsinki. ☎ 040 413 4252 💻 keith_uber@yahoo.com

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**
*Robert Bogenschneider*, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori 💻 robog@gmx.de
*Arvo Karvinen*, Piikintie 22 as 10, 00680 Helsinki. ☎ 040 502 3765 💻 arvo.karvinen@elisanet.fi
*Tiina Kosunen*, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 💻 eafkasisto@esperanto.fi


**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 💻 eafkasisto@esperanto.fi
**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**
Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet**: http://www.esperanto.fi

# Kresko ĝis krizo



Ideo pri unueca Eŭropo estas en krizo. Ŝuldoj de Grekio minacas la komunan monsistemon.

Ĝis nun la historio de Eŭropa Unio kaj eŭro estis daŭra kresko. La Unio havas jam historion de pluraj jardekoj el la karbo- kaj ŝtalokomunumo de ses landoj tra pluraj plivastiĝaj kaj evoluaj fazoj al la nuna unio de 27 landoj.

La eŭromonojn ekuzis 11 landoj en jaro 2002, poste aliĝis pliaj landoj kaj pliaj estas en prepara fazo. Ankaŭ en tio regas ideo pri kresko. Nun oni devas unuan fojon konsideri, ke iuj landoj eventuale disiĝos el la sistemo.

Facila klarigo por la krizo estas akuzi tiujn, kiuj trompis pri la kontoj de Grekio. Nu, estas klare, ke indas puni pro trompoj kaj ĝustigi la erarojn. Sed apenaŭ la tuta sistemo povas esti en fatala krizo pro nuraj trompaj agoj, la sistemo havas ankaŭ pli fundamentajn erarojn.

La eŭromona sistemo ekde sia fondo per kontrakto de Maastricht jare 1992 havis kriteriojn pri kiam lando taŭgas por esti ano de ĝi. La inflacio devus esti malpli ol difinita limo, la ŝtata ekonomio devus havi deficiton kaj ŝuldojn malpli ol difinita limo kaj la interezoj en la lando devus resti sub difinita limo. Grava eraro estis, ke oni ĉiam toleris landojn fuŝi pri tiuj kriterioj kaj tamen aliĝi al uzo de eŭroj. En la 90aj jaroj oni ofte diskutis, ĉu eblos enkonduki eŭrojn, ĉar estis preskaŭ neniu lando, kiu taŭgis pri la kriterioj.

Oni tamen havis emon al kresko kaj grandeco. Nepre oni volis konstrui la plej grandan ekonomian sferon de la mondo, pli grandan ol Usono, kiu jam dumlonge estis la plej granda. Ofte oni komparis, kiom estas la suma valoro de produktado en EU-landoj kaj kiom en Usono. Ankaŭ oni komparis la ekonomian kreskon en diversaj aziaj landoj kaj esprimis zorgon pri la fakto, ke la monda produktado pli kaj pli kolektiĝas ĉe randojn de la Pacifika oceano, kio signifas, ke Eŭropo restos en periferia situo. Al tiu oni volis respondi per unuigi la tutan Eŭropon.

Per tio EU povas nun fieri en statistikoj: la suma valoro de produktado en EU dum jaro 2009 estas 15 590 miljardoj dolaroj kaj tiu en Usono estas 14 270 miljardoj dolaroj. Se oni ankoraŭ povus inkluzivi ĉiujn EU-landojn al eŭro, tiam oni povus konsideri ĝin sendube la plej granda ekonomio de la mondo.

En la hasto kreski la eŭromonan sferon oni ĉiam interpretis, ke la kriterioj ne devas esti plenumitaj laŭdetale tiel, kiel ili estas skribitaj. Oni komencis interpreti, ke ekzemple ŝtataj ŝuldoj povas esti provizore pli ol difinite, se la tendenco estas malkreska. Fine oni reale konstatis, ke ne gravas, kiom la ŝtataj ŝuldoj multas kaj kreskas. Bonvenon al eŭro ĉiuj, estu la ŝuldoj eĉ duoble tiom, kiom rajtus esti, sufiĉas ke por estonteco estas ia espero ilin malkreskigi. Tiel en uzon de eŭroj venis tre ŝuldaj landoj, el kiuj nur unu estis Grekio, kaj la sekvo estis katastrofo.

Mi neniel kontraŭas malakrigon de landlimoj kaj harmoniigon de vivo en diversaj landoj. Uzo de eŭroj multe simpligis nian vivon kaj evoluigis nian bonfarton. Sed se oni faris saĝajn kriteriojn por eniri la sistemon, oni devus ne oferi la kriteriojn por la volo kreski kaj iĝi la plej granda. Ni povus evoluigi la eŭropan vivmanieron el nia propra perspektivo, kaj el perspektivo de individuaj homoj ĉi tie. Homo povas vivi feliĉa sen konsideri, ĉu la propra vivsfero estas la plej granda kaj forta en la mondo.

*Mikko Mäkitalo*

# Miksi!

La rubriko vortludas. La vorto ’miksi’ en la finna signifas ’kial?’

Finnlando fariĝis (ree; ni nun atentas malpli ol centjaran historion) iom plurnacia kaj plurlingva dum lastaj apenaŭ dudek jaroj. Antaŭaj grandaj popoltransmoviĝoj estis enlandaj – la evakuado kaj reloĝigo de duonmiliono da homoj el areo perdita en la milito en 1944 kaj la granda fuĝo al urboj en 1960–70-aj, kaj ellandaj. Kompare kun la malpli ol ducentmil eleksterlanduloj en Finnlando, la pli ol miliono da elmigrintaj finnoj estas granda amaso.

En la fruaj naŭdekaj Finnlando ricevis subite milojn da somaliaj rifuĝintoj sukcesintaj savi sin el la mezo de interna milito. Estas honore al Finnlando, ke ili estis memkompreneble akceptitaj kaj estis kreitaj sistemoj por ili. Ne laŭdinde estas, ke tiuj sistemoj tro komplike rilatis al ilia integrigo, kaj tio ne favoris ilian vivkomencon. Daŭre estas en la mondo teruraĵoj, kiuj devigas homamasojn el siaj hejmoj kaj de sia vivteno. Estas ankaŭ multaj, kiuj tiom perdas ekonomian sekurecon, ke estas devigataj serĉi eblecojn eksterlande.

Aserto, ke tiuj homoj forprenus ion de ni malnovaj loĝantoj de tiu ĉi lando, estas krom malmorala, ankaŭ soci-ekonomie sensenca. Laboro kaj produktado, civitana vivo kaj konsumado, renoviĝo de popolo estas frukto de mikso. Ĝusta akto fariĝas per justa trakto. Lando, laŭ difino de Zamenhof, apartenu al ĉiuj siaj filoj. Por Finnlando tio sig-

# Miksi?

Otsikon sanaleikki on siinä, että se on esperantoksi kehotus, suomeksi kysymys. Esperanton ‘miksi’ merkitsee sekoittamista.

Suomesta on tullut (uudelleen; nyt tarkastellaan vain miesmuistia) jonkin verran monikansallinen ja monikielinen alle kahdenkymmenen viime vuoden aikana. Meillä on kyllä koettu suuria muuttoliikkeitä ja myös pakolaisuutta – sodassa menetettyjen alueitten väestön asuttamista on pidetty poikkeuksellisen onnistuneena verrattuna useimpiin muihin samaan tilanteeseen joutuneisiin maihin. Se oli kuitenkin toisenlaista kuin ulkomaalaisten maahanmuutto.

Vasta lähes viisikymmentä vuotta myöhemmin Suomi sai ottaa vastaan merkittävän suuria pakolaisjoukkoja, kun Somalian sisällissotaa paenneita tuli tänne. On maallemme kunniaksi, että niitä ihmisiä ei pyrittykään lähettämään takaisin yönselkään, vaan otettiin vastaan tänne saakka henkensä edestä pyrkineet. Sittemminkin maailmassa on riittänyt kauheuksia, joitten vuoksi ihmisten on jätettävä kotinsa ja elantonsa. Monille käy myös niin, että elanto loppuu. Sellainen ajatus, että heidän tulonsa meille tuottavan kansantalouden jäseniksi veisi jotakin meiltä suomalaisilta, on paitsi moraalisesti väärä myös sosioekonomisesti mieletön. Työ ja toimeentulo, tuottaminen ja kulutus ovat toisiaan uudistavia, kansan taloutta – kun vain huolehditaan siitä, että työn ja toimeentulon ehdot ovat oikeudenmukaisia. Maata ei rakenneta kiertämällä sopimuksia eikä ohittamalla oikeuk-



nifas partoprenon de ĉiuj Finnlandanoj al komuna konsento, kaj nepran rifuzon al provoj de apartigo. Ni devas miksi.

La finna lingvo estas en interesa fazo. Unuafoje en grandetaj grupoj – laborejoj, lernejoj, loĝkvartaloj – la finna ĝeneraliĝas kiel interlingvo. Tio estas defia al politikistoj kaj interesa al esploristoj.

Esperantista vidpunkto povus esti individua-loka, regiona-landa, monda. Por lastenomita ni proponas solvon, kiu superas helplingvan uzon de lokaj kaj regionaj idiomoj.

sia. Suomalaisten, uusien ja entisten, kuuluu sekoittua ('miksi') keskenään.

Suomen kieli on monikansallistuvassa maassamme uudenlaisessa ja mielenkiintoisessa vaiheessa. Vasta nyt suomesta on tulossa useitten kansallisuuksien yhteiskieli. Se on kiinnostavaa tutkijoille ja haastavaa poliitikoille.

Esperantistinäkökulma voisi olla tällainen: Kansallisuus ja äidinkieli kuuluvat yksilölle, maa ja paikalliskieli yhteisölle; kaikkia maailman yhteisöjä varten meillä on nykyisen apukielijärjestyksen sijaan tarjolla aito yhteiskieli.

*Tuomo Grundström*



## Saluton!

Mi estas Valter Mäkitalo kaj mi naskiĝis la 30-an de majo. Mia patro estas nun iom okupata pro zorgi pri mi kaj volas rezigni el posteno de ĉefredaktoro. Do, ĉi tiu gazeto bezonos **novan ĉefredaktoron**, la tasko estos libera ekde komenco de venonta jaro. Mi volas voki ĉiujn pri la gazeto interesitajn finnajn esperantistojn konsideri, ĉu redaktoreco povus esti via tasko. Anoncu vian intereson al prezidanto de EAF dum somero aŭ aŭtuno – ju pli frue, des pli bone. Ni esperas, ke nova ĉefredaktoro povos jam frue antaŭ la jarŝanĝo prepariĝi, eventuale jam kunredakti lastajn numerojn de la kuranta jaro.

## Tarkennus haastatteluun

Aila Nieminen, jota haastateltiin lehdemme edellisessä numerossa, haluaisi lisätä seuraavan tiedon siitä, miten hän löysi esperanton. Esperanto oli kiinnostanut häntä jo useamman vuoden, kuten hän haastattelussa mainitsi, mutta lopullisen kimmokkeen antoi se, että esperantokurssit ovat juuri Auralan kansalaisopistossa, jossa Ailakin opettaa joogaa. Aila tulikin rohkeasti juttelemaan Auralan opiston aulassa, jossa yhdistyksemme viime syksynä lukuvuoden alussa esitteli esperantoa ja kursseja. Ja siitä kaikki alkoi, olemme saaneet Ailasta aktiivisen jäsenen joka on osallistunut jo mm. kurssitapaamiseen ja kevätkävelyyn.

*Tervetuloa mukaan, Aila!*
*EST/Turun Esperanto-yhdistys ry.*

# Andrei Korobeinikov – vieras musiikkimaailman huipulta


Helmikuun lopulla kerhomme esperanto-edustaja Lahdessa Martti Pennanen sai sähkepostia Japanista. Andrei Korobeinikovin ihailijaklubin tarmokas vetäjä Kikusima Kazuko, esperantomaailmassa tunnettu Krizantemo, kirjoitti että venäläinen, monen esperantistin tuntema Andreo Korobeinikov tulee Lahden Sibeliustaloon 25.2.2010. Krizantemo ehdotti, että lahtelaiset voisivat mennä väliajalla tervehtimään kuuluisaa taiteilijaa. Kuuluisa taiteilija konsertoi tällä erää Suomessa vain Hämeenlinnassa ja Lahdessa.

Ennakkoon paikalliset lehdet tiedottivat vierailusta: Kuullaan mm. pianokonserttikirjallisuuden rakastetuimpiin teoksiin lukeutuva Sergei Rahmaninovin toinen pianokonsertto. Solistina esiintyy vuonna 1986 syntynyt, merkittävää kansainvälistä uraa tekevä moskovalaispianisti Andrei Korobeinikov. Hän valmistui 19-vuotiaana erinomaisin arvosanoin Moskovan konservatoriosta, ja tätä ennen tämä poikkeuksellinen taiteilija oli valmistunut 17-vuotiaana lakimieheksi Moskovan eurooppalaisesta yliopistosta.

Konsertin jälkeen saimme lukea Etelä-Suomen sanomien konserttiarvostelija Arto Sakari Korpisen ylitsevuotavan arvostelun, joka on superlatiiveja alusta loppuun. ”Tässä on nimi, joka kannattaa pistää korvan taakse: Andrei Korobeinikov.” Hän jatkoi: ”Konsertin aloittaa erikoinen sointupylväiden sarja, jonka pianisti soittaa yksin. Miten hienosti Korobeinikov kasvattikaan sen voimaa äärimmäisen hiljaisesta pianissimosta sävähdyttävästi jyrähtäneeseen fortissimoon. Jo tämä johdanto riitti kertomaan, ettei flyygelin ääressä istunut rutiinisuoritukseen tyytyvä koskettimien takoja vaan musiikkiin täydellisesti paneutuva taiteilija. Esitys tarjosikin sulaa nautintoa niin valoineen kuin varjoineen, sillä Korobeinikovin huikea taituruus ja näkemyksellinen tulkintataito olivat erinomaisessa tasapainossa.”

Kansantajuisesti sanoen arvostelija ei meinannut pysyä nahoissaan, tai tarkemmin ajatellen ei pysynytkään. Konsertin arvostelujen siteeraaminen loppuu nyt tähän. Varmasti jotkut olisivat halunneet lukea enemmän. Anteeksi. Mutta tämän jutun juju on hiukan toinen. Vaikkapa: Andreo ja pieni esperantokerhomme. Konsertin väliajalla emme yrittäneet ängetä oletettavasti täyteen taiteilijan pukuhuoneeseen. Sen sijaan Martti sai puhelinyhteyden vieraaseen. Ilomielin tämä oli valmis tapaamiseen seuraavana päivänä kello yksi iltapäivällä. Niinpä perjantaina 26. helmikuuta kuusi kerhomme jäsentä odotteli Seurahuoneen aulassa kuuluisaa vierastaan. Varmuuden vuoksi kysyimme hotellin vastaanottovirkailijalta oliko tullut mitään muutosilmoitusta. Virkailija kertoi, että venäläinen pianisti oli jo lähtenyt hotellista. Jaahah. Se siitä. Päätimme kuitenkin odotella sovittuun aikaan asti. Täsmällisesti viereemme ilmestyi jostakin iloisesti hymyilevä nuori mies. Saluton, saluton! Tuo Esperantomaailmassa niin tuttu tervehdys reilun kädenpuristuksen kanssa. Olen tähän asti luullut, että juuri pianistin kädenpuristus on kuin lehmän nuolaisu. Toisaalta en ole koskaan puristanut kuuluisan pianistin kättä, itse asiassa en minkäänlaisen pianistin kättä.

Ravintolasalin suuressa ikkunanvieruspöydässä vietimme lähes kolme tuntia vilkkaasti keskustellen. Osoittautui, että vieraamme puhui hyvää esperantoa. Tämän lisäksi kysyttäessä hän kertoi puhuvansa englantia ja italiaa. Hän on hyvin perillä Venäjän ja Suomen historiasta. Kävimme läpi Venäjän historiaa, myös nyky-




***Korobeinikov sur KD-kovrilo en 2009.***

politiikkaa. Varsinkin Vilorg venäjänkielisenä pääsi mieliaiheeseensa suomen ja venäjän kielen eroavaisuuksiin. Ohjatakseni keskustelua kevyempään suuntaan kysyin vieraamme perhesuhteista, hän asuu äitinsä kanssa Moskovassa. – Entä tyttöystävä? Hän sanoi, ettei sellaista ole, hänhän on vielä nuori. – Oletan että varmaankin joskus löydät jonkun musiikin ammattilaisen vaimoksi? Tämä aiheutti niin ehdottoman jyrkän kiellon, että se sai aikaan naurunremakan. Miten hyvin esperantomme sopikaan tunnelmaan.

Kun kysyin missä hänen seuraava konserttinsa on, hän vastasi, että ensin Moskovassa, sitten Pariisissa. Nopeasti aika kului. Hänellä oli vielä sille päivälle yksi tapaaminen, sitten illalla Tolstoi-junalla Moskovaan. Toivoimme hänen seuraavan Lahden-vierailunsa aikana ottavan uudelleen yhteyttä meihin. Kun ajatellaan, miten voimakkaasti hän on matkalla maineeseen, pelkään ettei sellaista tilaisuutta tule. Nyt hän vielä oli yksin liikkeellä. Pakko sanoa sekin, että ehkä en ole koskaan tavannut ihmistä, josta huokuu sellainen määrä vaatimattomuutta, sympatiaa ja yksinkertaista mutkattomuutta. Mietin mitä me pystyimme antamaan hänelle. Luulenpa että kosketuksen tavalliseen suomalaiseen ihmiseen, ulkopuolelta musiikkimaailman. Ehkä tämä on tärkeää taiteilijalle, jotta suhteellisuudentaju säilyisi. Todennäköistä on, että julkisuus tulee pakostikin muuttamaan nuoren pianistin tulevien vuosien myötä. Se lienee julkisuuden laki – pitäisikö sanoa, kirous.

Epilogi: Kun Krysantemo tiedotti kerhollemme venäläisen pianistin Lahden-vierailusta, en heti tajunnut kenestä oli kysymys. Sitten äkkiä muistin. Minähän olin nähnyt tulevan vieraamme muutamissa Esperanton maailmankongresseissa jokusia vuosia sitten ja kuullut hänen soittavan useita kertoja, viimeksi Firenzessä 2006. Tuon kongressin jälkeen kirjoitin jutun Esperantolehteemme. Lainaan muutamia rivejä tähän lopuksi: Monen mielestä suosituin esiintyjä oli venäläinen nuori pianisti Andrei Korobeinikov, joka esiintyi useassa tilaisuudessa ja jolla oli oma konserttikin. Yleisö kuunteli hartaana ja osoitti raivoisasti suosiotaan. Tämä nallekarhumainen hämillisesti hymyilevä poika oli varsinainen symppis. Aluksi ajattelin, että hän tuskin osaa esperantoa, sittemmin kuulin hänen puhuvan kieltämme. Ennen ovien avautumista katselin miten pihalla odotelleet, etupäässä naiset, piirittivät nuorta miestä ja kuvauttivat itsensä tämän kainalossa. Kuvilla on arvonsa, jos vaikkapa pojasta tulee maailmantähti!

Näin siis kolme ja puoli vuotta sitten. Juttutuokiomme aikana vieraamme mainitsi, että nykyään hänen aikansa on niin varattu, ettei tahdo löytyä aikaa monipäiväiseen tapahtumaan.

*Esa Lång*

★

# Historia gazetaro rakontas kiel Esperanto venis al Finnlando

Ĝis la jaro 1909 en finnlanda gazetaro aperis pli ol 2000 mencioj (almenaŭ 2392) pri Esperanto kaj pli ol 700 mencioj pri volapük. La informo troveblas en digitigita gazetara arkivo (historiallinen sanomalehtiarkisto), kiu nun enhavas gazetojn ĝis la jaro 1909 (komplete ĝis la jaro 1900). Nun eblas kompletigi la informoj aperintaj en Esperantolehti 2/2006. La arkivo estas libere uzebla en interreto: *http://digi.kansalliskirjasto.fi*. Pro aŭtomata skanado de malnovaj gazetoj estas eble, ke la serĉilo ne trovas ĉiujn menciojn.



HUFVUDSTADSBLADET

**Esperantistoj.**

Kolektigho sur la opera teraso hodiau je la 2:a. Venu chiuj. Rim. la verdan standardon! (H. 1671)

**Ĉiujn esperantistojn en Finlando** mi petas, sendu min pri sian nomon profesion kaj adreson, tiuj ĉi sciigoj estos tre utilaj por nia afero. Sendu, volu la respondon al ladreso. Ilmari Söderström, Lahti Vesijärvi.

**Esperantistoj, observu!**

La 24:an de Februaro kunvenos la esperantistoj, kiuj komprenas kaj parolas Esperanton, je la horo 11,30 en Näsilinna Kafejo por praktike sin ekzercadi en la uzado de la internacia lingvo. La tuta progr»mo esperant'ingva.

Ilmoituksia.

**Esperantistoj!**

Ciuj esperantistoj presajoj estas acetablaj aù mendeblaj kaj gazetoj astas aboneblaj ce la Librejo.

**Martin kaj Mäkelä.**

Helsinki. It. Viertotie 6. Tel. 5434.

**La Grupo Esperantista**

de Tampere kunvenos ciudimance je l' ½12 matene en la malnova papollernejo por diskuti siajn kurantajn demandojn kaj praktike uzi Esperanton

Lokaj Esperantistoj allig'u al la Grups!

**Esperanto-**

kurssit alkavat jälleen **Yliopistolla** (2 kerr. oik.) keskiviikkona helmik. 10 pnä klo 8 illalla.

Kurssimaksu Smk. 5: —. (H.445)2144

**Onemolsösok**

spodo in nümi 7:id balamasüta al osevön numi volapükelas isik.

La unua mencio pri Esperanto aperis jam la 3-an de decembro 1887 en *Åbo Tidning* kaj la sama gazeto publikigis artikolon ankaŭ 6.12. 1887. Temis pri artikolo en du partoj, kiuj entute ampleksis preskaŭ unu paĝon de tiu gazeto. La prezento de Esperanto, subskribita de G. C. (eventuale redaktoro de la gazeto Gustaf Cygnaeus), estis detala, farita surbaze de la germana versio de la Unua libro. En 1888 aperis ankaŭ du mencioj en gazetoj, ambaŭ el ili rilatis al enhavo de revuo *Finsk Tidskrift*, kiu enhavis artikolon pri Esperanto.

Tiutempe gazetaro en Finnlando estis grandparte svedlingva. La nombro de finnlingvaj gazetoj superis la nombron de svedlingvaj nur en 1878 (kaj eĉ post tio svedlingvaj gazetoj aperis pli ofte kaj havis pli da paĝoj). Tial la mencioj pri Esperanto en svedlingvaj gazetoj superis tiujn en finnlingvaj, kun kelkaj esceptoj, ĝis la jaro 1902.

La unua finnlingva mencio aperis en *Uusi Suometar* 14.11.1890, sed nur kelkajn tagojn pli poste Esperanto estis menciata ankaŭ en regiona finnlingva gazetaro, nome en *Keski-Suomi* (Jyväskylä) 20.11.1890. En la sama jaro sekvis ankoraŭ mencioj en gazetoj *Savo* (Kuopio), *Waasan Lehti, Hufvudstadsbladet, Uleåborgs Tidning, Åbo Underrättelser* kaj *Finland*.

Mencioj pri volapuk (volapük aŭ volapyk) aperis ekde 1884 kaj en 1886-1889 estis multe da mencioj pri ĝi. La intereso al volapuk, se mezuri tion per gazetaraj mencioj, kreskis multe pli rapide ol la intereso al Esperanto. Nur en 1904 estis pli ol 90 mencioj pri Esperanto, sed volapuk atingis tiun nombron ja en tri jaroj, en 1886. Post 1889 mencioj pri volapuk komencis malaperi kaj en 1891 la plej ofta novaĵo pri volapuk estis, ke volapuk mortas, tamen ne pro premo de Esperanto, sed pro konflikto inter reformemuloj kaj volapuk-akademio (*Uusi Suometar* 6.2.1891, *Hämeen Sanomat* 27.2.1891, *Keski-Suomi* 28.2.1891 kaj aliaj).

Pri la fondo de la unua Esperanto-societo, Societo Esperantista Helsingforsa, raportis *Uusi Suometar* kaj *Hufvudstadsbladet* la 28-an de septembro 1894. Kiel la posta historio rakontas, la societo ne estis registrita kaj baldaŭ malaperis.

La mencioj en la gazetaro konfirmas, ke la komenco de Esperanto en Finnlando estis malrapida kaj post kelkaj aktiviĝoj denove sekvis silenta periodo. Ekzemple en jaro 1893 aperis neniu mencio pri Esperanto, en 1896 sep mencioj kaj en 1900 nur kvar mencioj. Vera kresko komenciĝis en 1904, kiam aperis pli ol 100 mencioj kaj en la supera jaro 1906 ili atingis pli ol 600. Ĝuste en februaro 1904 Esperanto vere inundis al finnlanda gazetaro ĉar multaj gazetoj raportis pri la apero de finnlingva lernolibro. Tamen, pri la apero de la unua finnlingva lernolibro en 1902 aperis nur kelkaj mencioj.

Kvankam Finnlando estis parto de Rusa imperio, nur la disvastigo de Esperanto en okcidento, unuavice en Francio ekde 1900, portis Esperanton vere al Finnlando, almenaŭ se juĝi laŭ gazetaraj artikoloj. La politika liberiĝo en Finnlando en 1905 certe helpis al Esperanto-movado, sed la populariĝo komenciĝis jam iom pli frue, en 1902–1904.

Plej granda parto el mencioj pri Esperanto estas mallongaj anoncetoj kaj informoj, ekzemple anoncetoj pri lernolibroj kaj kursoj aŭ eĉ esperantlingvaj anoncetoj pri kunvenoj. Entute aperis mencioj pri Esperanto en pli ol 100 gazetoj en pli ol 40 lokoj. Plej multaj mencioj aperis en *Hufvudstadsbladet* (206), *Uusi Suometar* (172), *Nya Pressen* (133), *Päivälehti/Helsingin Sanomat* (120), *Turun Sanomat* (119), *Aamulehti* (83), *Åbo Underrättelser* (71), *Tampereen Sanomat* (68), *Etelä-Suomi* (66), *Työmies* (61), *Kansan Lehti* (55) kaj *Kotimaa* (50). Do, en ĉefurbaj, Tampere-aj kaj Turku-aj gazetoj, krom *Etelä-Suomi*, kiu aperis en Kotka.

Iom pli ampleksaj artikoloj temis pri sukcesoj de Esperanto kaj foje ili estis eĉ tradukitaj el Esperanto. Ankaŭ komercistoj interesiĝis pri Esperanto: en *Kauppalehti* (7.2.1906) Esperanto estis proponita eĉ kiel libervola lernofako en komerca mezlernejo (apud la angla kaj la germana; la devigaj fremdaj lingvoj estis la sveda kaj la rusa). Rilate al lernado de Esperanto en komercaj lernejoj, aperis ankaŭ kritika artikolo, en *Helsingin Sanomat* (3.6.1909), kie la aŭtoro, subskribita kiel P. V., sugestas, ke baldaŭ aperos eĉ pli bona artefarita lingvo, same kiel Esperanto estis pli bona ol volapuk kaj demandis ĉu esperantistoj pretas aliĝi al tiu nova lingvo aŭ resti ĉe Esperanto, eĉ se ĝi ne estas plu la plej bona.

| Jaro | Mencioj pri Esperanto | Mencioj pri volapuk |
|---|---|---|
| 1884 | -- | 7 |
| 1885 | -- | 4 |
| 1886 | -- | 98 |
| 1887 | 2 | 141 |
| 1888 | 2 | 128 |
| 1889 | 0 | 121 |
| 1890 | 8 | 33 |
| 1891 | 23 | 32 |
| 1892 | 1 | 9 |
| 1893 | 0 | 15 |
| 1894 | 23 | 16 |
| 1895 | 39 | 17 |
| 1896 | 7 | 10 |
| 1897 | 16 | 5 |
| 1898 | 17 | 9 |
| 1899 | 11 | 9 |
| 1900 | 4 | 6 |
| 1901 | 13 | 10 |
| 1902 | 44 | 16 |
| 1903 | 30 | 14 |
| 1904 | 106 | 7 |
| 1905 | 128 | 6 |
| 1906 | 649 | 14 |
| 1907 | 596 | 10 |
| 1908 | 327 | 8 |
| 1909 | 346 | 3 |

Post 1905 en regiona gazetaro aperis men- ▷

# Esperanto-kolumno en Länsi-Suomi

La veterana ĵurnalistino Vappu-Erika Koskinen de tempo al tempo kolumnas en la regiona ĵurnalo Länsi-Suomi (Okcidenta Finnlando) aperanta en Rauma. La 29-an de marto ŝi kaptis esperanton kiel temon, inspirita de radia programo, intervjuo kun la fama teatra reĝisoro Raila Leppäkoski. Mi kaptis la okazon telefoni al la programo por gratuli, sukcesis trafi la redakcion kaj havis konversacieton pri la juneco de Raila en Jyväskylä kaj ŝia patro J.E.L. (1901–1984) kaj lia monumenta kulturago, la traduko de Kalevala en esperanton.

En la radio Raila Leppäkoski konstatis, ke ŝuistido botojn ne havas; ŝi ne esperantiĝis, kvankam havis la unuajn internaciajn spertojn esperante. La patro laŭ ŝi pleje nur verke aktivis, sed ja venis ekzotikaj vizitantoj.

Vappu-Erika Koskinen rakontas ĉi tie pri sia bapto-patrino, instruistino Elmi Tamminen, ĉe kiu la patrino de VEK kaj la juna esperantistino Tyyne Leivo (poste Leivo-Larsson, post parlamenta kariero Finnlanda ambasadoro en Norvegio) loĝis dum studenteco en Helsinki. Ankaŭ la studentino Vappu-Erika ĉiusemajne vizitis la onjon, sed – domaĝe, konstatas – ne sekvis la onklinan admonon ellerni esperanton.

En la gastlibro de onjo Elmi estis nomoj el 42 landoj. Somere la sentima fraŭlino veturis kiel pasaĝero en kargoŝipoj ĉirkaŭ la globo. Por esperantistoj la mondo jam antaŭ jardekoj estis tutglobo, la konstruita lingvo estas neŭtrala kaj amikrilata kun la mondo, VEK finas. *–tg*

## Esperantoa Piispankalliolla

Kuuntelin tässä taannoin teatteriohjaaja Raila Leppäkosken haastattelua. Ohjelmaan sai soittaa, ja eikös vain Tuomo Grundström Raumalta soittanut ja kertonut tunteneensa haastateltavan isän, joka oli toimittaja ja innokas esperantisti. No, Grundströmhän on esperantistien puheenjohtaja Suomessa.

Ja siitäpä tuli mieleeni yksi mainioista kummitädeistäni, helsinkiläinen, aikoinaan leiskuvan punatukkainen opettaja Elmi Tamminen, jonka luona äitini oli asunut yhdessä Tyyne Leiwo-Larssonin kanssa opiskeluaikoinaan.

Itse ravasin joka viikko kummitätini luona omana opiskeluaikanani. Hän yritti innostaa minuakin oppimaan esperantoa, mutta omaksi vahingokseni en muka ehtinyt.

No, joskus viisikymmenluvulla kummitätini

---

▷ cioj pri fonditaj Esperanto-societoj, ekzemple en Kemi (*Pohjois-Suomi* 15.11.1905), Tampere (*Tampereen Sanomat* 27.1.1906) kaj en Suursaari, kiun oni nomis la unua kampara Esperantosocieto en Finnlando (*Helsingin Sanomat* 3.3.1906), kaj eĉ en Rovaniemi (*Pohjois-Suomi* 14.12.1908) kaj Kemijärvi (*Pohjois-Suomi* 7.12.1908), kiu estis la plej norda Esperanto-societo en la mondo. Aperis raporto pri la fondo de Esperanto-societo eĉ en kampara vilaĝo Toisvesi en Virrat (*Sorretun voima* 3.1.1908).

Pri la fondo de Esperanto-Asocio de Finnlando aperis raportoj en *Nya Pressen* (30.4.1907), *Uusi Suometar* (1.5.1907) kaj *Hufvudstadsbladet* (1.5.1907). Kurioze, en ĉefurba gazetaro la unua nomo en la finna estas Suomen Esperantoseura, kaj en la sveda Esperanto Samfundet i Finland. Tamen regiona gazetaro, *Aamulehti*, *Turun Sanomat* kaj *Etelä-Suomi*, uzis la ĝustan formon "Esperantoliitto" en siaj raportoj.

*Jukka Pietiläinen*

vieraili mökillämme Rihtniemessä. Yhdessä hänen ja äitini kanssa menimme retkeilemään Piispankalliolle.

Siellä törmäsimme arvokkaan näköiseen herrahenkilöön, joka näytti nuuskivan rantakiviä.

Vanhat daamit kiinnostuivat. Kummitäti tarjosi keskustelukieleksi ranskaa, äitini saksaa tai ruotsia. Ei, ei kelvannut, hän oli englantilainen botanisti.

Silloin kummitäti päästi suustaan pitkän litanian esperantoa, ja sai salamannopeasti vastausrepliikin samalla kielellä. (Ai, että mikseivät daamit puhuneet englantia? No, kun sitä ei luettu heidän kouluaikoinaan. Eikä sen puoleen minunkaan lukioaikanani, jolloin se oli vaihtoehto ranskan kanssa.)

Siitä keskustelusta tuli pitkä ja perusteellinen. Kummitäti toimi tulkkina, äiti ja sympaattinen englantilainen puhuivat vimmatusti sammalista, jäkälistä ja rantakasveista yleensä. Siinä istuttiin rantakivillä pari tuntia.

Sitten äiti ehdotti kahville – teelle menoa, herra professori (kuten kävi ilmi) katsoi kelloaan ja huokaisi, että häntä odotettiin jo, ja niin päättyi se palaveri.

Maailma oli silloin ennen esperantisteille pieni pallo. Laskin kerran kummitätini vieraskirjasta 42 kansallisuutta. Näillä maailman kielen taitajilla oli, ja on yhä, tapana ottaa yhteyttä toisiinsa missä tahansa maailmankolkassa.

Joku sanoo, että kyllähän englannilla pärjää missä vain. Tottahan se on, mutta tuo tekemällä tehty kieli, esperanto, on jotenkin puolueeton ja maailmaan ystävällisesti suhtautuva. Sen puhujalla on ystäviä ympäri maailman.

*Vappu-Erika Koskinen*
*Länsi-Suomi 29.3.2010,*
*tekijän luvalla*

## Morse-alfabeton kaj Esperanton

Esperanto-societo de Oulu kaj Kultursocieto de Metsäkylä okazigos radioamatoran tendaron en Metsäkylä, Taivalkoski 26.–29.7.2010. Enkondukon en radioamatorismon, elementan Esperanto-kurson, sciojn pri la konstruado de radiostacio kaj pri kontaktiĝoj en Morse-lingvo kaj en Esperanto. Demandojn kaj aliĝojn tel. 040-5187242 / Aini Vääräniemi, Taivalkoski, Finnlando, aŭ rete *aini.esperanto@suomi24.fi*

## Kursaro en Lesjöfors

Mardo 13 – merkredo 21 de julio estos someraj kursoj je pluraj niveloj en E-kursejo, Lesjöfors, Svedio (meze inter Stokholmo kaj Oslo). Ankaŭ kursoj pri esperantologio, tradukado de kantoj k.a., vidu *www.esperanto.se* (ligilo sub ”Aktuellt”) <*kurs.egarden@esperanto.se*>

Lesjöfors estas trankvila vilaĝo apud lageto inter vastaj altaĵaj arbaroj. Bela somera aŭ vintra feriejo. Bonvenon al granda Esperanto-gastejo/kursejo!

*informis Douglas Draper,*
*estrarano de la kursejo/gastejo*

## Eventokalendaro de EAF

**2010**

27.6.–2.7.2010 Esperantokurso en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi

17.–24.7.2010 Universala Kongreso de Esperanto, Havano, Kubo

10.–12.9.2010 Aŭtunaj Tagoj en Estonio

**2011**

marte Vintraj Tagoj de EAF

# Pääaiheena talvipäivät Jyväskylässä

Keskisuomalainen kirjoitti 18.3.2010 Jyväskylän esperantokerhon toiminnasta ja Suomen Esperantoliiton puheenjohtajan Tuomo Grundströmin ajatuksista esperantosta. Juttu liittyi Suomen Esperantoliiton talvipäiviin Jyväskylässä. Turun Sanomien Kirjoittajavieras-palstalla 6.12.2009 Jorma Ahomäki kirjoitti käynnistään esperanton kehittäjän, L.L. Zamenhofin haudalla Varsovassa. Helsingin Sanomissa 14.11.2009 kerrottiin lyhyesti, kuinka Euroopan esperantoliitto mainosti kieltään Le Monde -lehdessä, kun lehti kertoi ranskalaisopiskelijoiden huonosta englannin kielen taidosta.

Keskisuomalainen-lehdessä uutisoitiin Suomen Esperantoliiton talvipäivistä, joiden teema oli suomen kieli kansakunnan rakentajana ja Jyväskylä tämän kehityksen yhtenä keskuksena. Tuomo Grundström piti esperantoa yleiskielenä, jota kaikki voivat puhua ja oppia hyvin. Kielen hallitseminen tuo rikkaita ja syviä kokemuksia, kontakteja ja ystävyyttä ihmisten välille ympäri maailmaa. Jyväskylä on yksi esperanton kasvupaikoista Suomessa. Kieltä puhuttiin kaupungissa yli sata vuotta sitten. Tänä päivänä Jyväskylässä toimii joka toinen viikko kokoontuva esperanton opintopiiri.

Keskisuomalainen-lehden toimitussihteeri Johan Edward Leppäkoski käänsi aikanaan Kalevalan esperantoksi, mikä oli merkittävää esperanton harrastajien kannalta, kertoi Jyväskylän Esperantokerhon puheenjohtaja Seija Kettunen.

Lehti kuvasi Pasporta servo -palvelua, jonka avulla esperantistit voivat majoittua matkoillaan toistensa luona eri maissa. Tuomo Grundström sanoi majoittaneensa esperantisteja Saksasta, Ruotsista, Ranskasta, Japanista, Italiasta ja Venäjältä sen lisäksi, että on matkustanut itse maailmalla.

Esperanton uusin oppikirja on Esperantoa mutkattomasti -oppikirja, jota voivat käyttää yli 10-vuotiaat koululaiset sekä myös aikuiset itseopiskeluun.

Keskisuomalaisen kainalojutussa kerrottiin yleistietoa esperanton keksimisestä, käytöstä ja rakenteesta. Ajatuksena oli luoda luonnollinen kommunikointimahdollisuus eri maiden ja kielien käyttäjille. Kieli perustuu pääosin eurooppalaisiin kieliin, ja esperantoksi on kirjoitettu kirjoja ja sävelletty lauluja. Kansainväliset tapahtumat, tapaamiset ja internet ovat tärkeitä kielenkäytön areenoita. Jutun kuvassa Tuomo Grundström on liitutaulun äärellä. Tauluun hän oli kirjoittanut: www.lernu.net

### Muistokäynti Zamenhofin haudalla

Turun Sanomien Kirjoittajavieras -palstalla Jorma Ahomäki kirjoitti käynnistään Ludwik Zamenhofin haudalla Varsovassa hänen kuolemansa 150-vuotismuiston vuoksi. Ahomäki meni paikalle 14. kertaa. Hän kuvaa bussimatkaa Varsovan linja-autoasemalta hautausmaalle Varsovan gheton muistomerkin ohi sekä kaupungin uudisrakentamista ja kunnostamista.

Hautausmaalla on hiljaista. Muita ihmisiä ei näy, ja alueen kasvisto on päässyt villiintymään vähäisen hoidon vuoksi. Zamenhofin haudalla on tuoreita kukkia.

Zamenhof julkaisi yli 120 vuotta sitten esperanton oppikirjansa ja nyt kieltä käytetään yli sadassa maassa eri tavoilla. Turkulainen kosmopoliitti ja diplomaatti G.J Ramstedt käytti kirjaa Aurajoen rannoilla jo 1890-luvulla, kirjoitti Ahomäki.

Le Monde -lehti Ranskassa kertoi ranskalaisopiskelijoiden huonosta englannin kielen taidosta, kun he sijoittuivat 69. kansainvälisessä kielivertailussa. Asiasta tuli keskustelunaihe

## Nova situacio en Pola Radio

Ekde la 17-a de majo la sola salajrata laboranto de la Esperanto-redakcio, Gabi Kosiarska, kaj kelkaj aliaj, okupiĝos pri ŝanĝoj en la interreta portalo de la Pola Radio. La funkciado de la Esperanta servo estas frostigita por nedifinita daŭro. En la reta paĝaro intertempe aperados ripetoj de programeroj. Oni flegas la esperon, ke post kelka tempo ĉiuj komisiitaj povos reveni al siaj kutimaj okupoj, interalie Gabi Kosiarska al la Esperanta sekcio.

Kun demandoj pri la nova situacio oni povas turni sin al la Prezidanto de Pola Radio, Jarosław Hasinski, Prezes Zarzadu PR S.A., al. Niepodleglosci 77/85, 00-977 Warszawa, Pollando (rete: *Jaroslaw.Hasinski@polskieradio.pl*) aŭ, laŭ la sama poŝta adreso, al Pawel Majcher, Czlonek Zarzadu. Oni skribu en sia nacia lingvo, la angla aŭ la pola. Leteroj sole en Esperanto estas malkonsilindaj. La adresatoj estas la prezidanto de la estraro, respektive membro de la estraro de Pola Radio.

La Esperanto-elsendoj de Pola Radio komenciĝis en aprilo 1959, sojle de la Zamenhof-jubilea UK en Varsovio. En 1993 UEA premiis la Esperanto-redakcion per la prestiĝa Premio Deguĉi. Bona pruvo pri la daŭra populareco de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio estas la kreo de ties amikaro en Facebook, al kiu en nuraj tri monatoj aliĝis pli ol 800 ŝatantoj.

Retejo de la Esperanto-redakcio, kun ligiloj al la podkastaj elsendoj:
*http://www.polskieradio.pl/eo/*

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

lehteen, ja sen lomassa Euroopan Esperanto-yhdistys julkaisi lehdessä mainoksen, jossa todettiin, että ”Eurooppa kärsii angloamerikkalaisen kielen hallinnasta” ja vedottiin siihen, kuinka helppoa on oppia esperantoa, kun siinä ei ole epäsäännöllisyyksiä tai monimutkaisuuksia.

*Jukka Noponen*

## Jubilea kongreso en Peterburgo

Ruslanda Esperantista Unio, REU, havis sian jubilean kongreson kiel la 27-an post la unua en 1910. Kiel oni povas kalkuli, historio ne favoris trankvilan evoluon de nia movado, ankaŭ ne en Ruslando/Sovetunio. Partoprenis la kongreson ankaŭ 13 finnoj, trajn-karavane 27–31.5. sub kompetenta gvido de Ritva Sabelli, kaj ĝuis artan, sciencan kaj turisman programon. Raportojn kaj fotojn en sekva numero, nun el la REU-komunikaĵo:

Estis elektita nova estraro:

Grigorij Arosev (Moskvo) – prezidanto

Svetlana Smetanina (Moskvo) – vicprezidanto

Vladimir Bespalov (Soĉi) – estrarano

Jurij Karcev (Uljanovsk) – estrarano

Rafija Kudrjavceva (Jekaterinburg) – estrarano

Darja Obrazcova (Sankt-Peterburgo) – e-ano

REU rekomendas al UEA nomumi Svetlana Smetanina Ĉefdelegito de UEA en Rusio.

**La ĉefaj agadoj**

REU eldonas librojn en kaj pri la lingvo Esperanto, kompakt-diskojn, bukletojn kaj ceterajn necesajn por ĝia funkciado materialojn, kiujn disponigas al siaj membroj, kaj la revuon REGo (Rusia esperantista gazeto). Krome, REU organizas (mem, aŭ kunlabore kun aliaj esperantistaj organizoj, unuavice REJM) Rusiajn Esperantistajn Kongresojn (REKojn), somerajn aranĝojn, la plej gravaj el kiuj estas Rusiaj Esperanto-Tagoj (RETоj), festivalojn, el kiuj plej gravas Esperanto – Lingvo Arta (EoLA), kaj aliajn renkontiĝojn, kaj penas alimaniere servi al spertaj kaj komencantaj esperantistoj en plialtigo de sia lingva kaj kultura nivelo, propagando de Esperanto, disvolvo de Esperanto-kulturo.

*(tg)*

## Volumo pri ideoj de Zamenhof

Sub la titolo ”Religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof: kultura kaj socia fono” aperis la aktoj de la 32-a Esperantologia Konferenco, kiu okazis en la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko en 2009. La volumon redaktis Christer Kiselman, kiu ankaŭ gvidis la konferencon.

En la volumo aperas la prelegoj de Tsvi Sadan (Tsuguya Sasaki) el Israelo/Japanio (”Juda fono de Zamenhof kaj Esperanto”), Vytautas Ŀilas el Litovio (”Zamenhof kaj Litovio. Nia judo”), Zbigniew Romaniuk el Pollando (”Novaj faktoj el la vivo de la Zamenhof-familio”) kaj Christer Kiselman el Svedio (”La evoluo de la pensado de Zamenhof pri religioj kaj la rolo de lingvoj”) kaj krom ili antaŭparolo de Kiselman, enkonduko de Louis C. Zaleski-Zamenhof kaj konkluda parolo de Humphrey Tonkin. ”Religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof” havas 65 paĝojn kaj ĝia prezo ĉe la Libroservo de UEA estas € 9,90 (plus sendokostoj).

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## Libroj por Kubo

Por kubaj esperantistoj la libroservo de la 95-a UK en Havano estos unika okazo aĉeti Esperanto-librojn. Por ke ili povu efike utiligi tiun, UEA rabatos prezojn kaj krome alvokas donacojn al la speciala konto ”Libroj por Kubo”. La kolektita sumo estos egale dividita inter la kubaj kongresanoj, kiuj ricevos donackuponon por butikumado en la libroservo. Kiu volas diskonigi la Esperantan literaturon en Kubo, bv. fari sian donacon prefere antaŭ la fino de junio. Oni povas pagi al kiu ajn bankokonto de UEA aŭ ĝiri el sia UEA-konto. La pago havu la indikon “Libroj por Kubo”. UEA dankas al ĉiuj, kiuj kontribuos al la kampanjo!

*(el komuniko de UEA prenis mm)*

## Komitatanoj B elektitaj

La 1-an de junio okazis en la Centra Oficejo de UEA la nombrado de la voĉoj donitaj en la elektado de ses Komitatanoj B por la periodo 2010–2013. Balotilo estis sendita al 4801 individuaj membroj, el kiuj voĉdonis 1550, t.e. 32,3%. Elektiĝis Mark Fettes (1010 voĉoj), Probal Dasgupta (973), Barbara Pietrzak (876), Amri Wandel (820), José Antonio Vergara (816) kaj Wu Guojiang (732).

La Komitatanoj B reprezentas en la supera organo de UEA la individuajn membrojn. Por ĉiu komencita milo da membroj estas unu Komitatano B. Krome ĉiu landa kaj faka asocio, aliĝinta al UEA, rajtas nomumi Komitatanon A, se ĝi havas pli ol 100 membrojn. Aliaj asocioj nomumas observantojn, kiuj ne havas voĉdonrajton en la komitatkunsidoj. Fine la Komitatanoj A kaj B rajtas alelekti Komitatanojn C, kies nombro ne rajtas esti pli ol la kvarono de tiu de la Komitatanoj A kaj B.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*



## Aldono

Sur paĝo 11 de EF 2/2010 aperis foto pri muzikanta duo en Vintraj Tagoj, sed mankis iliaj nomoj. Estas Riikka Kannisto (maldekstre) kaj Sanna Astikainen. Ambaŭ studas lingvojn en la universitato de Jyväskylä.

*EF = Estonoj kaj Finnoj, Aŭtunaj Tagoj internacie*

# Aŭtunaj Tagoj en Estonio
# Syyspäivät Virossa

*10.–12.9.2010*

Aŭtunaj Tagoj en Estonio havos multflankan turisman kaj kulturan programon. Ni renkontiĝos kun lokaj esperantistoj kaj konatiĝos en diversaj kulturaĵoj de nia suda najbarlando.

La programo por niaj aŭtunaj tagoj aspektas jena. Etaj ŝanĝoj kompreneble ĉiam estos, sed jen la grandaj linioj.

Por vojaĝi el Helsinki al Tallinn vi povas elekti inter du alternativoj: Eckerö Line ekveturas vendrede 10.9. jam je la 8a kaj estos en Tallinn je 11a. Tiam vi havus la tutan tagon en Tallinn kaj povos pli longe renkontiĝi kun lokaj esperantistoj. Alia ebleco estos ekveturo je 17.30 per Tallink Silja Line. Reen ĉiuj veturas kune pere de Eckerö Line.




*Syyspäivien ohjelma on sekä matkailu- että kulttuuripitoinen. Tapaamme paikallisia esperantisteja ja tutustumme monipuolisesti eteläiseen naapurimaahamme.*

*Tässä syyspäivien ohjelma. Pienet muutokset ovat toki mahdollisia mutta näin matka sujuu pääpiirteissään.*

*Tallinnaan menoa varten on kaksi mahdollisuutta. Eckerö Line lähtee perjantaina 10.9. jo klo 8.00, jolloin Tallinnassa ollaan klo 11.00. Siten on mahdollista olla koko päivä Tallinnassa ja myös tavata pitempään paikallisia esperantisteja. Toinen mahdollisuus on lähteä Helsingistä klo 17.30 Tallink Silja Linella. Takaisin palaamme kaikki yhdessä Eckerö Linen laivalla.*

**Vendrede 10.9.2010 Perjantai**

**Grupo 1 / Ryhmä 1**

6.30 Kolektiĝo en la terminalo de ECKERÖ LINE en Helsinki (adreso: Länsiterminaali, Hietasaarenkuja 8, rakennus L4) plej malfrue je la 6.30. Disdonado de biletoj kaj aliaj informoj. Sigi prizorgas pri tiu ĉi grupo.
Kokoontuminen Eckerö Linen terminaalissa Helsingin Länsiterminaalissa viimeistään klo 6.30. Lippujen ja muiden tietojen jako. Siirtyminen laivaan. Sigrid Kivistö huolehtii ryhmästä.

8.00 Ekveturo el Helsinki per Eckerö Line. Surŝipe komuna kunestado laŭ eblecoj.
Lähtö Helsingistä Eckerö Linen laivalla. Laivalla yhteisoloa mahdollisuuksien mukaan.

11.00 Alveno al Tallinn. Saapuminen Tallinnaan.
Eble jam en haveno renkontiĝo kun estonaj esperantistoj. Tranoktejoj laŭ elekto Sokos Hotel Viru (Viru Väljak 4) aŭ hostelo Alur (Raekoja plats). Paikalliset esperantistit tulevat mahdollisuuksien mukaan vastaan. Majoittumiset: Sokos Hotel Viru, Viru Väljak 4, tai Hostel Alur, Raekoja plats Tallinnan keskustassa.

20.30 Komuna kunestado kun grupo 2 kaj estonaj esperantistoj.
Yhteinen illanvietto molempien ryhmäläisten ja paikallisten esperantistien kanssa.




**Grupo 2 / Ryhmä 2**

15.30 Kolektiĝo en la terminalo de SILJA LINE en Helsinki (adreso: Länsiterminaali L4, Hietasaarenkuja 8) plej malfrue je la 15.30. Disdonado de biletoj kaj aliaj informoj. Tiina prizorgos pri la grupo.
Kokoontuminen Siljan terminaalissa Helsingin Länsisatamassa viimeistään klo 15.30. Lippujen ja muiden tietojen jako. Siirtyminen laivaan. Tiina Oittinen huolehtii ryhmästä.

17.30 Ekveturo el Helsinki per Tallink. Surŝipe komuna kunestado laŭ eblecoj
Lähtö Helsingistä Tallinkin laivalla. Laivalla yhteisoloa mahdollisuuksien mukaan.

19.30 Alveno al Tallinn. Saapuminen Tallinnaan.
Eble jam en haveno renkontiĝo kun grupo 1 kaj kun estonaj esperantistoj. Tranoktejoj laŭ elekto Sokos Hotel Viru (Viru Väljak 4) aŭ hostelo Alur (Raekoja plats)
Paikalliset esperantistit tulevat mahdollisuuksien mukaan vastaan.
Majoittumiset: Sokos Hotel Viru, Viru Väljak 4, tai Hostel Alur, Raekoja plats Tallinnan keskustassa.

20.30 Komuna kunestado kun grupo 1 kaj estonaj esperantistoj.
Yhteinen illanvietto molempien ryhmäläisten ja paikallisten esperantistien kanssa.

**Sabate 11.9.2010 Lauantai**

9.00 Ekveturo el Tallinn kun propra aŭtobuso al Tartu. Dumvoje kelkaj paŭzoj laŭbezone.
Lähtö Tallinnasta omalla bussilla Tarttoon. Matkalla tarvittaessa taukoja.

12.00 Alveno al Tartu. Saapuminen Tarttoon.

Tranoktado laŭ elekto en hotelo Dorpat (en la urbocentro) aŭ hostelo Starest (ekster la urbocentro). Lunĉo proprakoste, ni trovu kune taŭgajn lokojn por tio.
Yöpymiset: joko hotelli Dorpat (keskustassa) tai hostelli Starest (keskustan ulkopuolella). Lounas omatoimisesti, etsitään sopivia paikkoja yhdessä.

En programo konatiĝo kun la universitato, prezentado de historio kaj famaj personoj de la urbo kaj universitato, urba rondirado kaj muzea vizito laŭdezire, renkontiĝo kun lokaj esperantistoj.
Ohjelmassa tutustuminen yliopistoon, sen ja kaupungin historiaan sekä kuuluisiin henkilöihin, kaupunkikävely ja museokäynti toiveiden mukaan, paikallisten esperantistien tapaamisia.

19.00 Komuna kunestado manĝante ktp.
Yhteinen illanvietto

**Dimanĉo 12.9.2010 Sunnuntai**

8.30 Ekveturo el Tarto kun propra aŭtobuso.
Lähtö Tartosta omalla bussilla

10.00 Alveno al urbeto Paide, kie konatiĝo en kastelo kaj lunĉo (proprakoste).
Saapuminen Paiden pikkukaupungiin, jossa tutustumme paikalliseen linnaan. Lounas omakustanteisesti.

12.30 Ekveturo al Tallinn. Lähtö Tallinnaan.

14.00 Alveno al Tallinn. Eniro al la ŝipo de Eckerö Line. Saapuminen Tallinnaan. Siirtyminen Eckerö Linen laivaan.

16.00 Ekveturo de Eckerö Line. Surŝipe komuna kunestado laŭ eblecoj. Lähtö Tallinnasta Eckerö Linen laivalla. Laivalla yhteisoloa mahdollisuuksien mukaan.

19.30 Alveno al Helsinki.
Saapuminen Helsinkiin.

Ĝis la revido kaj bonan hejmvojaĝon!
Näkemisiin ja hyvää kotimatkaa!

### Enhavoj de AT-paketoj

**AT-paketo 10.–12.9.2010, paketo 1** 130 e
(inkl. Helsinki–Tallinn per Tallink Silja Line je 17.30, tranoktadojn (2-lita ĉambro) en hotelo Viru, Tallinn kaj hotel Dorpat, Tartu, busveturon Tallinn–Tartu–Tallinn, Tallinn–Hki per Eckerö Line)

**AT-paketo 10.–12.9.2010, paketo 2** 104 e
(inkl. Helsinki–Tallinn per Eckerö Line je 8.00, tranoktadojn (2-lita ĉambro) en hotelo Viru, Tallinn kaj hotel Dorpat, Tartu, busveturon Tallinn–Tartu–Tallinn, Tallinn–Hki per Eckerö Line)

**AT-paketo 10.–12.9.2010, paketo 3** 93 e
(inkl. Helsinki–Tallinn per Tallink Silja Line je 17.30, tranoktadojn en hostelo Alur, Tallinn (granda dormĉambro) kaj hostelo Starest, Tartu (2-lita), busveturon Tallinn–Tartu–Tallinn, Tallinn–Hki per Eckerö Line)

**AT-paketo 10.–12.9.2010, paketo 4** 70 e
(inkl. Helsinki–Tallinn per Eckerö Line je 8.00, tranoktadojn en hostelo Alur, Tallinn (granda dormĉambro) kaj hostelo Starest, Tartu (2-lita), busveturon Tallinn–Tartu–Tallinn, Tallinn–Hki per Eckerö Line)

## Aliĝu jene

– Elektu la plej konvenan paketon kaj plenigu la aliĝilon (aŭ skribu retpoŝton). Informu ankaŭ vian naskiĝdaton kaj naciecon por la ŝipvojaĝoj.
– Notu, ke post la 9.8. ni ne povas garantii, ke estos lokoj sur ŝipoj kaj hoteloj en anoncitaj prezoj. La prezoj estas kalkulitaj por 40 partoprenantoj entute.
– Sendu la aliĝilon al la oficejo de EAF en Helsinki, aŭ aliĝu rete al adreso *eafmendoj@esperanto.fi*.
– Pagu la kotizon al la konto de la Asocio uzante la referencnumeron en la aliĝilo.

Notu! La uzo de referencnumero sparas de ni bankkostojn. Aliĝilo necesas, ĉar la nura sumo ne rakontas al ni viajn sciojn. Sendu la aliĝilon al la oficejo aŭ uzu retadreson *eafmendoj@esperanto.fi*

**ALIĜILO**

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF 10.–12.9.2010 en Estonio

Nomo

________________________________________

Adreso

________________________________________

Telefono (portebla)

________________________________________

Ret-adreso

________________________________________

Naskiĝdato / nacieco:

________________________________________

Aliĝkotizo:

18 e ĝis 9.8.2010 ___

22 e poste (se restas lokoj) ___

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

**AT-paketo 10.–12.9.2010, paketo 1** 130 e ___

**AT-paketo 10.–12.9.2010, paketo 2** 104 e ___

**AT-paketo 10.–12.9.2010, paketo 3** 93 e ___

**AT-paketo 10.–12.9.2010, paketo 4** 70 e ___

**Entute pagenda al la konto de EAF** ________

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.
Bv. uzi la VT-referencnumeron 4640.

Pliaj informoj aŭ deziroj:

________________________________________

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
Retaj aliĝoj tra *eafmendoj@esperanto.fi*

BONVENON!

**ILMOITTAUTUMISLOMAKE**

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton syyspäiville 10.–12.9.2010 Virossa

Nimi

_______________________________________

Osoite

_______________________________________

Puhelin (kännykkä)

_______________________________________

Sähköposti

_______________________________________

Syntymäaika/kansalaisuus

_______________________________________

Ilmoittautumismaksu:

18 e 9.8.2010 asti ___

22 e 9.8.2010 jälkeen (jos on tilaa) ___

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

**AT-paketti 10.-12.9.2010, paketti 1** 130 e ___

**AT-paketti 10.-12.9.2010, paketti 2** 104 e ___

**AT-paketti 10.-12.9.2010, paketti 3** 93 e ___

**AT-paketti 10.-12.9.2010, paketti 4** 70 e ___

**Maksut yhteensä Suomen Esperantoliiton tilille** _________

Tilinumero: Sampo 800017-230825. Käytä viitenumeroa 4640 (ei muita tietoja maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia:

_______________________________________

Lähetä lomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
tai tiedot sähköpostitse *eafmendoj@esperanto.fi*

TERVETULOA!

## AT-pakettien sisällöt

**AT-paketti 10.–12.9.2010, paketti 1** 130 e
(Hki–Tallinna Tallink Silja Linella klo 17.30, yöpymiset (2-h huone) hotelli Viru, Tallinna ja hotelli Dorpat, Tartto, bussimatka Tallinna–Tartto–Tallinna, Tallinna–Hki Eckerö Linella)

**AT-paketti 10.–12.9.2010, paketti 2** 104 e
(Hki–Tallinna Eckerö Linellä klo 8.00, yöpymiset (2-h huone) hotelli Viru, Tallinna ja hotelli Dorpat, Tartto, bussimatka Tallinna–Tartto–Tallinna, Tallinna–Hki Eckerö Linella)

**AT-paketti 10.–12.9.2010, paketti 3** 93 e
(Hki–Tallinna Tallink Silja Linella klo 17.30, yöpymiset hostelli Alur, Tallinna (iso makuusali) ja hostelli Starest, Tartu (2-hh), bussimatka Tallinna–Tartto–Tallinna, Tallinna–Hki Eckerö Linella)

**AT-paketti 10.–12.9.2010, paketti 4** 70 e
(Hki–Tallinna Eckerö Linella klo 8.00, yöpymiset hostelli Alur, Tallinna (iso makuusali) ja hostelli Starest, Tartu (2-hh), bussimatka Tallinna–Tartto–Tallinna, Tallinna–Hki Eckerö Linella)

---

### Por demandoj estas je via dispono:

– Tuomo Grundström (programo de la tagoj)
– Markus Sunela (turismaj informoj pri Estonio)
– Tiina Oittinen (praktikaĵoj pri vojaĝado)
– Päivi Saarinen (aliĝilo kaj pagoj)

La kontaktinformojn de ili vi trovos sur paĝo 2. Kunvojaĝos ankaŭ Sigrid Kivistö, kiu ja bonege helpos nin konante la landon.

# Ilmoittautuminen

– Valitse sinulle sopiva paketti ja täytä tiedot ilmoittaumislomakkeeseen tai kirjoita sähköposti. Muista ilmoittaa myös syntymäaikasi ja kansallisuutesi laivayhtiötä varten.
– Huom! 9.8.2010 jälkeen emme voi taata, että laivoissa ja hotelleissa on tilaa samalla hinnalla. Hinnat on laskettu siten, että päiville osallistuu 40 henkilöä.
– Lähetä lomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai toimita vastaavat tiedot sähköpostitse osoitteeseen *eafmendoj@esperanto.fi*.

– Maksa osallistumis- ja pakettimaksu ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille.

Huom! Käytä maksaessasi pankkiin viitenumeroa, jolloin säästät yhdistyksen pankkikuluja. Pelkän maksun perusteella emme voi päätellä mitä haluat, joten myös ilmoittautumistietojen lähettäminen on tarpeen joko postitse liiton toimistoon tai sähköpostilla *eafmendoj@esperanto.fi*

**Lisätietoja saat meiltä:**

– Tuomo Grundström (päivien ohjelma)
– Markus Sunela (Viro matkailumaana)
– Tiina Oittinen (käytännön matkajärjestelyt)
– Päivi Saarinen (ilmoittautuminen ja maksut)

Yhteystietomme ovat sivulla 2.
Matkalla on mukana myös Sigrid Kivistö, jonka paikallistuntemus on meille suureksi avuksi.



***La fama kliniĝanta domo ĉe la urbocentra placo en Tartu.***

# Estona mozaiko

Ĉi aŭtune, en septembro (10.–12.9) nia landa asocio EAF aranĝos la tradiciajn Aŭtunajn Tagojn en Tallinn kaj Tartu.

Fine de majo 2010 mi rendevuis en Tallinn kun Vjaĉeslav Hromov kaj Mall Pärn, lokaj samlingvanoj. Varma dankemo plenigas mian koron; la du tagoj glate kaj agrable fluis.

Jen kelkaj impresoj kaj eroj por miaj samlandanoj pere de konataj movadanoj sude de la Finna Golfo.

**VALEV KRUUSALU** (1938–2008). Li estis vera laborformiko. En la jaro 2004 aperis granda, 810-paĝa vortaro de Raimund Haabvere. Valev apartenis al la redakcia komisiono kaj respondecis pri la enpaĝigo. Persiste li plenumis la postuleman taskon. Necesas substreki la signifon de la vortaro ankaŭ por finnoj. Ofte oni trovas solvon de enigmaj esprimoj ĝuste sur la paĝoj de tiu ĉi vortaro. Mia amiko Valev estis brava patrioto. Li multon tradukis, i.a. la gvidkajeron ”La Estona Liberaera Muzeo”, kiun krome oni konas per la nomo ”Rocca al Mare”. Etnografiaj vortoj postulis profundan pripensadon, sed Valev ŝatis defiojn. Pluraj aliaj publikaĵoj ricevis sian lingvan formon pere de lia krajono.



***(Fotita dum BET 39)***

**VIRVE ERNITS** (1932). Ŝi estas denaska Tallinn-ano, loĝanta en Kuressaare. Jam delonge ŝi estas ĉefdelegito de UEA en Estonio. Ni babilis pri la finn-estonaj interrilatoj. Ŝi menciis Villem Ernits (1891–1982) el Tartu, studkolego de Urho Kekkonen en la Universitato de Helsinki. Dum grava kaj signifoplena ŝtatvizito en 1964 en Estonio Kekkonen festparolis en la Universitato de Tartu. Profesoraj kolegoj de Ernits maltrankviliĝis, ĉar li surhavis eluzitajn kostumojn. ▷

Ili kolektis inter si monon donace al Villem, por aĉeti novan kostumon okaze de tiu grava vizito. Venis la festotago. Villem alvenis – en malnova kostumo – kaj prenis sian lokon en la unua vico. La kolegoj petis lin iri al la lasta seĝo-linio. Alveninte Kekkonen jam sur la sojlo de la pordo rimarkis sian studamikon en la fono de la salono. Li tuj rapidis al Villem Ernits. Ili amike kaj kortuŝe ĉirkaŭbrakumis unu la alian. Neniu atentis pri la vestaĵo de la estona profesoro.

**JAAN OJALO** (1914–2004). Pri lia multflanka aktivado, redakti, traduki kaj respondeci pri gravaj movadaj postenoj ni menciu kelkajn erojn. Estis kortuŝe renkonti lin inter la lokaj klubanoj en La Instruista Domo ĉe Raekoja-Placo en la koro de Tallinn. Ankoraŭ kiel 90-jarulo li partoprenis kunvenojn, kvankam estante malforta. Por ni gravas lia "Estona–Esperanta Vortaro", kiu aperis en 1999. Cetere fruktodone uzebla kune kun la Haabvere-vortaro. En la jaro 2000 aperis lia "Enciklopedio pri la Estona Esperanto-movado". Ĝi aspektas modesta, sed plenplena da interesaj informoj pri homoj kaj movadaj faktoj. Ni finnoj bezonus similan verkon. Estona dojeno Jaan Ojalo, montris vojon sekvindan. Mi alte taksas la libron "Esperantaj sinonimoj". Bone mi memoras lin kaj lian agadon.



**MALL PÄRN** (1936). Menciinde estas ke en 2008 ŝi tradukis la verkon "Zamenhof-strato" en la estonan sub la titolo "Zamenhofi tänav". Ĝi estas aĉetebla en Viru-Centro proksime al la samnoma hotelo. Multe mi interesiĝas pri la lingvoj de niaj sudaj najbaroj. Unue mi legis dek liniojn de la originalo kaj tuj poste laŭte citis la tradukitan tekston. Mi emis daŭrigi ĝis la fino. Mi konstatis, ke la traduko vivas, fluas kaj fidele sekvas la originalon. La teksto de Roman Dobrzynski havas lingve malfacilajn punktojn, kiujn saĝe venkis la tradukinto. Ĉe la tiklaj punktoj kunlaboris Helve Leis, kiu studis estonan filologion en Tartu. Kompare kun la originalo la tradukaĵo estas pli riĉe ilustrita. La Kroata Esperanto-Ligo subvenciis la estonan eldonon. Jam aperis pli ol dek tradukoj de tiu grava verko. Kiu kuraĝulo entreprenos la finnan version?

**ELISABETH LINNUSE** (1896–1973). Siatempe ege aktiva estis Elinjo, kuzino de konataj Dresen-fratinoj. István Mórocz renkontis ŝin en Budapeŝto antaŭ la tragika jaro 1956. Ankoraŭ post paso de multaj jardekoj István memoras la kortuŝan akcepton de Elisabeth Linnuse, kiu vojaĝis al Hungario por renkonti la konatan kaj faman poeton kaj instruiston Julio Baghy. Ĉu vi rimarkas kiel eta estas nia mondo? Eĉ la nomon de la menciita estonino István konservis en la memoro. Eble pro tio, ke ekzotikis paroli Esperanton kun estonino.

**KALLE VÄISÄLÄ** (1893–1968). La lasta nomo en la "Enciklopedio" de Jaan Ojalo estas nia konata, finna matematikisto, kiu profesoris en la Universitato de Tartu dum la jaroj 1919–1921. Tie li instruis ankaŭ Esperanton. Komence la rektoro grumblis, ke profesoro donas sian valoran tempon al tia, laŭ li tute bagatela afero. Aliĝis 100 gestudentoj kaj la rektoro silentis! Estona-finna kunlaboro estis ĉiam vigla.



Aliĝu al la Aŭtunaj Tagoj en septembro 2010 kaj pluportu la torĉon sur tiu ĉi kampo.

*Jorma Ahomäki*

# Printempa ekskurso en Turku

Tradicia printempa ekskurso de la Esperanto-Societo en Turku estis organizata dum du tagoj kun la sama enhavo. La tagoj estis du mardoj: 18a kaj 25a de majo je la 17a horo. La ĉefa celo estis la biblioteko de Åbo Akademi, la svedlingva universitato flanke de la Katedralo de Turku. La ekskursantoj entute estis sufiĉe multnombraj, kiam oni kalkulas ekskursantojn de ambaŭ tagoj (entute estis 20). Komence oni kolektiĝis ĉe la statuo de J. J. Wecksell, kiu staras antaŭ la biblioteko, kaj kie la gvidantoj komencis sian laboron. Leena Tiusanen parolis Esperantlingve kaj Tiina Oittinen tradukis finne, por ke ankaŭ la malpliprogresantaj klubanoj pli bone komprenu.

Josef Julius Wecksell (1838–1907) estis finna poeto kaj dramisto. Li havis mallongan sed prosperan karieron. Oficiale li publikigis nur du verkojn *Valda ungdomsdikter* kaj dramon *Daniel Hjort*, kiun oni daŭre povas aktori. Estante nur 24-jara Josef Julius fariĝis mensmalsana kaj malsana li mortis post multdekjara vivo en Lapinlahti mensmalsanulejo, kie oni ankaŭ kelkan tempon flegis Aleksis Kivi. Probable la verkistoj tie renkontiĝis. Oni diras ke Wecksell estis la plej talenta verkisto el svedlingvaj verkistoj de malfrua romantika tempo. La statuon skulptis Yrjö Liipola, fama postmilita skulptisto.

Antaŭ ol oni eniris la bibliotekon, Leena rakontis pri la biblioteka domo. Fama finna arkitekto Erik Bryggman (1891–1955) desegnis la domon, kiu vekis internacian intereson pro siatempa moderna konstruo, kiu entenis t.n. libran turon. Bryggman komence laboris kune kun Alvar Aalto, sed kiam Aalto translokiĝis al Helsinki, Bryggman restis vivi kaj labori en Turku, kaj en Turku estas multaj konstruaĵoj desegnitaj de li. La plej fama el ili estas bela releviĝo-kapelo en la tombejo. Bryggman planis ankaŭ la rekonstruon de la malnova kastelo de Turku. Kastelo suferis grandajn damaĝojn dum militoj.



***En la bibilioteko: Anna-Liisa, Tuuli, Paula, Varpu (dorse), Leena, Anja kaj Helena.***

Ankaŭ la areo de laboristaj loĝdomoj en Pansio estas planita de Bryggman.

Sekve la ekskursantoj eniris la bibliotekon. Nuntempe ĝi aspektas malmoderna kompare al la tute nova urba biblioteko. Tamen ĝi estas tre bone ekipita per la komputiloj kaj similaj rimedoj. Ĝi estas ankaŭ tre trankvila. Estas abunda loko por studantoj kaj larĝa manlibrejo. Sur muroj malnovaj portretoj de famaj gravuloj rigardas studadon de nuntempaj gejunuloj. Grava afero estas, ke troviĝas multaj esperantlingvaj verkoj en la biblioteka kolektado kaj alvenos al la legosalono i.a. la magazino *Monato*. Post kelktempa trairo kaj konatiĝo estis tempo eliri.

La ekskurson solene fermis la vizito ĉe la Esperanta rozo, kiun oni plantis en la jaro 1995, kiam en Turku okazis la antaŭkongreso de Tamperea UK. La rozo bone vivas sed postulas flegadon, kiun kelkaj klubanoj promesis organizi. La kulturplena ekskurso estis finita kaj la ekskursantoj disiris kontentaj.

*Bruno Lehtinen*

# Ekologia bieno ĉarmis en Keuruu

La tradicia printempa ekskurso de Jyväskylä-klubo gvidis nin sabate la 22an de majo al Keuruun ekokylä, ekologiema bieno en mezfinna komunumo Keuruu.

En bonhumora kaj trankvila etoso preskaŭ 20 partoprenantoj konatiĝis kun la bieno. Unue loĝanto Seija Mannila rakontis pri la historio, nuntempo kaj vivstilo de la komunumo. Ni aŭdis multajn interesajn detalojn kaj eksciis inter alie, ke tie loĝas proksimume 25 personoj, inter ili ankaŭ infanoj, kaj ke la bieno havas entute 50 hektarojn da spaco, konsistanta duone el kamparo kaj arbaro. La vivo en la bieno baziĝas sur ekologiaj valoroj kaj la vivstilo estas komunumeca: ekzemple en ĉiu lundo okazas komuna kunsido, en kiu la enloĝantoj decidas pri gravaj aferoj.

Ni vizitis kelkajn konstruaĵojn de la bieno kaj promenis en la biena korto antaŭ la komuna manĝo. Poste ni havis etan promenon en la apuda arbaro. La varma kaj suna vetero dorlotis nin dum la tuta tago, kio kuraĝigis nin promeni eĉ al la proksima ĉelaga saŭno. Tie ni havis komunan foton kaj ni ĝuis la trankvilan kuneston. Finfine estis tempo reveni hejmen. Dankon al ĉiuj partoprenintoj!

*Raportas partoprenintо Paula Niinikorpi*



***Seija Mannila rakontis al esperantistoj pri la ekobieno***



***Printempa sunbrilo dorlotis ankaŭ la kultivejojn***

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle:**
**Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti *ilkka.santtila@welho.com*.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 💻 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 💻 www.esperanto.fi/jyvaskyla
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala. 💻 http://esperantooulu.info/ aini.esp@hotmail.com
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla 💻 matti.wallius@ebaana.net
- Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. 💻 www.esperanto.fi/tampere (pj. tapani.aarne@mbnet.fi ☎ 050 5245 823)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. 💻 tiina.oittinen@pp.inet.fi

- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) Teivaalantie 85, 33400 Tampere. 💻 sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: 445023-283606
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. 📠 (09) 660 651 💻 steleto@pp.inet.fi
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 14 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta.

Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 20 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 40 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on aktiivinen esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu säännöllisesti. Ryhmän yhteystiedot: (Martti Pennanen) Esperantoklubo de Lahti, Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. 💻 martti.pennanen@phnet.fi

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan “Esperanto” kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta. Aktiivisia harrastajia on mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna aperas dum la jaro 2010**

| Nro | Red.grupo komencas | Limdato | Aperas |
|---|---|---|---|
| 4 | 10.7. | 15.7. | en aŭgusto |
| 5 | 10.9. | 15.9. | en oktobro |
| 6 | 10.11. | 15.11. | en decembro |

### Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

| Ulkopuoliset mainostajat / Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 e | 1/1 sivu/paĝo 50 e |
| 1/2 sivua/paĝo 60 e | 1/2 sivua/paĝo 30 e |
| 1/4 sivua/paĝo 40 e | 1/4 sivua/paĝo 20 e |

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: *eafgazeto@esperanto.fi* aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

# Ekspoziciaj tabuloj lueblaj – Turun näyttelytaulut vuokrattavissa

Multaj el vi vidis la finnlingvajn ekspoziciajn tabulojn, kiujn ni origine faris por la januara ekspozicio en Turku kaj poste transportigis al Jyväskylä marte. La tabuloj prezentas diversmaniere la multajn flankojn de Esperanto. La grandeco de la tabuloj estas A2, do ĉirkaŭ 55 x 40 cm, komparu kun la grandeco de taga gazeto. De samaj tabuloj estis faritaj ankaŭ pli malgrandaj en grandeco de A3 (40 x 30 cm) por la ekspozicio en Kaarina. Krome ni faris de kongresaj bultenoj anoncojn, grandeco A4.

Ĉiuj tiuj tabuloj kaj anoncoj estas lueblaj de Esperanto-societo en Turku. Se vi deziras vidi la enhavon de la tabuloj, ni povos sendi ilin kiel PDF al via retadreso. Poste ni liveros ilin ekzemple per poŝto aŭ aŭtobuso al via uzo tiel, ke la ricevanto pagos la transportkostojn. Ni volonte akceptos ankaŭ alian rekompencon, ĉar nia societo uzis konsidereblan sumon farante la tabulojn. Kiam la tabuloj estis en Jyväskylä dum Vintraj Tagoj, Esperanto-klubo de Jyväskylä pagis transportkostojn kaj EAF subtenis pagante rekompencon, de kio ni elkore dankas.

*Turun Esperanto-yhdistyksen teettämät esperanton esittelytaulut ovat vuokrattavissa muihinkin näyttelyihin Suomessa. Tauluja on 7 kpl kahdessa eri koossa (A3 ja A2) ja ne esittelevät monipuolisesti esperantoa. Lisäksi meillä on A4:n kokoisia värivalokopioita maailmankongressien tiedotteista. A2-kokoiset taulut olivat jo esillä Turun kirjastonäyttelyn jälkeen Jyväskylän kirjastossa talvipäivien aikaan. Toimitamme taulut vastaanottajan laskuun esim. Postin tai Matkahuollon kautta. Ne saa etukäteen nähtäväksi PDF-tiedostoina.*

Kontaktu – Ota yhteyttä:
Turun Esperanto-yhdistys ry, Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku.
Sähköposti/retp. *tiina.oittinen@pp.inet.fi* tai/aŭ puh./tel. 050 549 4709 tai/aŭ (02) 230 5319.

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy elokuussa. Jutut 15.7.2010 mennessä päätoimittajalle. La venonta numero aperos en aŭgusto. Artikoloj ĝis 15.7.2010 al la ĉefredaktoro. Osoite/adreso: Mikko Mäkitalo, Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku, puh/tel. (02) 2373 848, s-posti/rete: <*eafgazeto@esperanto.fi*>.

**Kopio Niini, Tampere 2010**